Theodor Storm,

# Oktobra kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nebulas, falas foliar';
La glason vi plenigu!
La grizan tagon ni al ni
Per vino pliheligu!

Se furiozas ĉio ĉi
Ekstere en la mondo,
Ne estas detruebla ja,
La bela tera rondo!

Se tremas ankaŭ via kor',
La glasojn vi tintigu!
La ŝtormo ekster nia dom'
Min ne malkuraĝigu!

Nebulas, falas foliar';
La glason vi plenigu!
La grizan tagon ni al ni
Per vino pliheligu!

Aŭtuno regas ĉie, sed
Atendu nur tempeton![2]
La suno ridos, la printemp'
Kreskigos ja floreton.

La bluaj tagoj ekas nun,
Ni volas ilin ĝui;
La tempo fluas, vane ni
Ne lasu ĝin forflui!

*Traduko de la Germana poemo "Oktoberlied" de* THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-174-351 (2004-02-22 17:52:01)*

[2] aŭ eble:
Atendu nur momenton!
La suno ridos, la printemp'
Kalmigos ja la venton.